Mensuel
Numéro 60
Décembre
2009

# La SAGO

## La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto : vers une culture sociale sans frontières.*

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €



# Ni krizkontraŭu !

# Kia socia organizado por estonteco ?



**65a kongreso de SAT-Amikaro**



**ARMOR 2010**



**3-6an de aprilo**
**Hiliono**



# Speciala prikongresa numero

http://kongreso2010.sat-amikaro.org

# Flore kuku !

## Citrona torto

*(ne bretona, tamen bona)*

Por 6 aux 8 personoj:
- 1 murbo
- 125 g da sukero
- 100 g da butero fandita
- 3 ovoj
- suko de 2 citronoj

Varmigu la fornon je 200 °C.
Metu la murbon en la torto-pladon.
Miksu kune ovojn kaj sukeron ĝis eta ŝaŭmiĝo; poste aldonu buteron kaj la citronan sukon.
Verŝu la miksaĵon sur la murbon kaj enfornigu.
Kuirado daŭras proksimume 30 minutojn.



El nia agendo

# Pariza Zamenhofa Festo



## *Escepta koncerto de Jomo*

Jomo, fama artisto, koncertos kadre de la Zamenhofa festo organizata de francaj fervojistoj AFCE

sabaton la 12an de decembro de 14a30 ĝis 17a, ĉe 17/19 rue traversière en Parizo

Programo kostas 3€ kaj loterio 2€.

Oni planas festan etoson dank'al tiu talenta artisto.


## *Z-festi «Kantilie»*

En la SAT-Amikara sidejo (134 Bd Vincent-Auriol) ni Z-festos dimanĉon 13an de decembro ekde la 15a kun la parizregiona e-ĥoro «Kantilie».

Antaŭ tio okazos matene je la 10a jarkunveno de la Pariza Grupo de SAT-Amikaro, kiun sekvos komuna tagmanĝo en apuda restoracio.

La Z-tago estas ankaŭ la tago de la esperanto-libroj do kaptu la okazon de via ĉeesto en la libroservo por elekti legindan jarfinan donacon!





## La vorto de la OKK-prezidanto

# Ni krizkontraŭu ! Kia socia organizado por la estonteco ?

Ni volegas prezenti kongreson proksima al niaj kolektivaj nunaj zorgoj.

Krizo havas kaŭzojn bone konatajn kaj devigas nin komenci profundajn tujajn ŝanĝojn.

Sed kiujn?

Tiel ni alpaŝos, kun fakuloj, konkretajn problemojn el nia medio:

- la abelmortado kaj la akvopoluado. Ĝi pridemandas niajn kutimajn agmanierojn pri nia nutro-produktado. Ni bone scias ke ni nepre kontestu nian aktualan organizadon je la elpaŝo al la naturo, sed kiu elektota vojo ?

Ni spronu niajn pripensojn per :

- debato pri kriza eliro, evoluoj kaj proponoj.

- la dokumenta filmo pri Louis Guilloux «la nesubiĝinto», engaĝita pensisto kaj verkisto. Li konkretigis siajn agadideojn...

Kaj eĉ en la arta programo ni trovos pripensigajn elementojn, tra la tekstoj de Gijomo kaj la verkaĵo de Pablo Neruda (Canto General).

Estu trankvilaj, ni antaŭvidis malstreĉajn momentojn meze de tiuj gravaj debatoj.

Momentoj por spiri kaj eskapi, malkovrante ĉirkaŭaĵon de San Briego, ĝian belan golfeton kaj belan regionon per la tuttagaj proponitaj ekskursoj :

- tiu ĉi oriente de la departemento, kadre de Argoato (*argoat* bretonlingve = interna parto de Bretonio). Vi malkovros la mezepokan urbon *Dinan* kaj ĝian ĉirkaŭaĵon.

- tiu alia okcidenta ekskurso (vidu malsupre) malkovrigos al vi marbordojn kaj lokajn specialaĵojn.

Kaj evidente kulturajn, amuzajn vesperojn.

Kongreso por pripensi nian estontecon antaŭ ol aliaj homoj pensos ĝin anstataŭ ni.

**Por la OKK**
**(Organiza Kongresa Komitato),**
**La prezidanto: Philippe Stride**



La fetiĉa koboldo de l' kongreso desegnita de Stéphane Lemarchand.

### *Iru ekskursi okcidenten!*

*Ni estas en 78 post J-C (Jacques Chirac) . La tuta Gaŭlio estas okupata de eŭropanoj parolantaj fuŝe la anglan. Tuta Gaŭlio? Ne, du vilaĝoj loĝataj de nevenkeblaj bretonoj rezistas ankoraŭ kaj ĉiam kontraŭ la potenco de la fuŝangla lingvaĉo, kaj la vivo ne estas facila por la adorantoj de la makdonalda kulturaĉo ….*

*Marde, post la SATamikara kongreso, ni proponas al vi iri kune okcidenten por malkovri la belegan marbordon konsistantan el rozkoloraj granitŝtonoj sed ankaŭ veran gaŭlan vilaĝon kaj veran esperantan vilaĝon …*

### *Ekskursa plano*

9:00 Foriro de San-Briego per aŭtobuso
10:00: Malkovro de la duoninsulo «*Renote*» en *Tregastel* ĉe la rozkolora granitŝtona marbordo apud *Perros-Guirec*
11:30: Vizitado de la gaŭla vilaĝo en *Pleumeur Bodou*.
12:00: Gaŭla manĝaĵo en la ĉef-kabano de la vilaĝo. La bretona magia supo estos eble trinkebla!
14:00: Veturado ĝis *Pluezek* tra urbeto *Treguier* kaj kastelo «*La roche Jag*»
16:00: Vizito de la muelejo *Kraka* en *Pluezek*
16:30: Malkovro de la statuoj de esperantistino *Marie Eon*
17:00: Manĝeto kun la urbestro de *Pluezek*
18:00 Aŭtobuse al San-Briego (alveno ĉ. 19:00)
Prezo: 35 € (kun manĝo)
(Pri tio , vidu ankaŭ P.16)

# Enhavo


1 & 3 Kovrilpaĝo
Ni krizkontraŭu !
2 Flore Kuku
El nia agendo
BildDeliraĵo: La kastel-nova grupo,10
4 Provizora programo
4-5 Selle-Humuraĵoj
5-6 Metamorfozo de la salajreco en Francio (dua parto)
6 Leginda legendo: La antaŭuloj de la Inkaoj
**Supplément en français**
7 Louis Guilloux
8 - 10 «Un congrès ouvert à tous»: parties du programme ouvert au public.
10 Le mot du Président
11 Utilaj informoj
- Kiel traduki: Face
12 Libro-Servo
13 Libro vivas pli ol unu sezono: Naskiĝo...
14 Kongres-gastigejoj
15 -16 Ekskursoj


***Partoprenis en ĉi numero:***
*(laŭ alfabeta ordo)*

| | |
|---|---|
| Andreo | Andrio |
| | Co |
| Jean-Claude et Hélène | Dubois |
| Stéphane | Lemarchand |
| Ĵak | Le Puil |
| Franjo | Leveque |
| Flora | Markov |
| Vito | Markovo |
| Guy | Martin |
| Rolande | Nedellec |
| Laurent | Peuch |
| Jean | Selle |
| Philippe | Stride |
| Serĝo | Sir' |
| Juliette | Ternant |
| Amapola | Triguero |

**La kongres-aliĝilo estas sendita kune kun tiu numero de La Sago.**

**Kontrolu, ke ĝi efektive troviĝas.**

# Okcidenta tuttaga ekskurso

## ARMOR 2010

### *Iru okcidenten ĉe la gaŭloj!*


Ĉu vi konas *Asterikson* kaj *Obelikson*? Kompreneble Jes! Tiuj amuzaj kaj batalemaj gaŭloj estas konataj de ĉiuj. Sed ĉu vi rigardis kie lokiĝas ilia eta vilaĝo? Spektu atente la mapon: estas ĉe ni apud la Armorika marbordo…



Mia edzino *Hélène* kaj mi estas ankaŭ veraj gaŭloj ekde 20 jaroj. Fakte, ni estas de tiu tempo volontuloj en asocio kiu nomiĝas «la gaŭla vilaĝo» kaj zorgas pri tre bela sed nekonata gaŭla vilaĝo kreita 24 jarojn antaŭe.



Tiu loko estas turisma parko kie ĉiuj familianoj de la tuta mondo ŝatas ludi kune kaj malkovri samtempe la vivon de



niaj gaŭlaj prauloj. Sed estas ankaŭ asocio kiu helpas ĉiujare pagi la instruistojn de ĝangalaj lernejoj en Nord-Togolando.

Dum la SAT-amikara Kongreso Armor 2010, marde, ni plezure ĉiĉeronos vin Okcidenten de nia departemento. Tie estas la marbordo tre bela kun egaj rozkoloraj ŝtonamasoj. Ni vizitos unue piede la duoninsulon «*ile Renote*» en *Tregastel*. Tiu natura loko estas mirinda miksaĵo inter maro, rokoj kaj arboj. Kiam oni pripensis lokon por nia gaŭla vilaĝo, oni elektis unue lokon kiel tiu.

Sed poste, la vera elektita loko kie la vilaĝo estis konstruita, estis *Cosmopolis* kion ni vizitos tuj poste. En *Pleumeur Bodou* lokiĝas la scienca parko *Cosmopolis* kie oni povas spekti inter arboj strangan blankan globegon «*le radome*» kiu ebligis je la 1960a jaro televidumi tra-space kun usonanoj. Nun tiu Globo estas historia monumento sed ĝi estas por ni la bretonaj gaŭloj bela luneto lokita en nia kamparo . Oni nomas tiun globegon «*Radum*» rilate al niaj maljunaj romiaj amikoj.




Do, apud tiu konata luneto lokiĝas nia gaŭla vilaĝo kiun mi plezure montros al vi. La vilaĝo estas belega kun lageto kie anasoj kaj anseroj ĉiam banas sin. La domoj estas argile konstruitaj kun kanaj tegmentoj kiel la veraj gaŭlaj domoj sed ankaŭ kiel la domoj de niaj afrikaj amikoj en Togolando. Ĉiujare, ĉirkaŭ 60 000 vizitantoj partoprenas en la diversaj proponataj agadoj kaj ebligas al ni perlabori multan monon por helpi en Afriko.




Ni tagmeze manĝos tie gaŭlan manĝaĵon antaŭ ol veturi ĝis alia vilaĝo tre konata de la esperanta mondo: *Pluezek*! Tie okazas bretona miraklo ekde 12 jaroj: La internaciaj esperantaj renkontoj de *Pluezek* kun pli ol 120 partoprenantoj kiuj ĉiujare gustumas la veran ĉarmon de bretona somero. *Pluezek* estas vilaĝo apud *Paimpol* kie ni vizitos esperante tre belan muelejon «*Kraka*» kun mirega vidaĵo ĝis insuleto *Brehat*. Tuj poste, ni kune teumos en la ĝardeno de *Marie Eon*, esperanta talenta skulptistino. Ne forgesu vian fotilon ĉar tie vi povos foti belegajn skulptaĵojn kaj eĉ veran bretonan «*Ankou*» el la maro….



Esperanto estas ŝlosilo por gustumi novan landon kaj lokon. Tion ni celas por vi!



**J.C. Dubois**
**marbordo@gmail.com**
**Pluezekaj renkontoj - www.pluezek-esperanto.net**
**Gaŭla vilaĝo - levillagegaulois.free.fr**



